

## Bondeziroj kaj prisciencaj aforismoj

dediĉe al 80-jaraĝa amiko kaj filozofo-sciencisto

"La cervon magian serĉas mi.  
Priridu min, amikoj, tamen kuras mi  
Post forfluganta rev' ...  
Ja mi, jam sole mi, eĉ nun  
Kurada post la cerv' magi'."

Per tiuj ĉi linioj el poemo de Rabindranath TAGORE (1861-1941) « La cervon magian... » mi salutas la jubileulon Josef Kavka, por mi Joĉjo, memore al ekzakte antaŭ 40 jaroj, en 1962, kiam ĉefia geologo kaj pli juna hungara geologo amikiĝis. Li gajnis min por Esperanto, kaj dum jardekoj subtenis min (kaj ne nur min!) per klara intelekto kaj varma koro. Ĝis hodiaŭ li ŝuldas pro tio, ke mi aktivis/-as en Esperanto geologie kaj alimaniere.

Elkore kaj amike, Andreĉjo Dudich

Okaze de la jubileo de nia alte estimata kaj kore amata  
Jozefo Kavka

mi – Ottó Haszpra - tradukis tiun ĉi hungaran poemeron  
kiu plej trafe karakterizas lian ideon pri agadmaniero:

Labori nur precize, bele,  
Kiel stel' iras surĉiele,  
Indas tiel.

JÓZSEF Attila (1905-1937)

La sciencoj fine ekzistas pro tio, refuti unu la alian. La botaniko diras, ke tropikaj arboj kreskas tiom altaj, ke la ĝirafoj trovu senpere sian nutraĵon. Sed la zoologio instruas, ke la ĝirafoj nur tial havas tiom longajn kolojn, ke ili atingu la arban supron. Nu, tio estas ŝerco. Sed pri la utileco de ŝerco la sciencoj denove interbatalas, kaj pro tio ni ree alvenas al la funda legitimeco de la unua frazo: la sciencoj fine ekzistas por refuti unu la alian. \*

Ankaŭ la penso estas vivaĵo, kiun oni daŭre kaj ĉiam denove devas flegi, eĉ nutri. Alie ĝi fariĝos malvigla kiel maljuna ĉevalaĉo; ĝi acidiĝos kaj fariĝos ranca kiel malfrua butero; fine ĝi mortos, kvankam en la komenco ĝi promesis fariĝi io granda kaj fruktozona. \*

\*Fonto: Heinz STEGUWEIT: "Mit vergnügten Sinnen", Hanseat. Verlagsanstalt Hamburg (1938).

Kun same „plezurplenaj pensoj“ mi memorigas pri la grandaj meritoj, kiujn d-ro Kavka, honora membro de nia asocio, akiris por ISAE kaj la internacilingva scienco, kaj kore gratulas okaze de la 80a naskiĝdatreveno en la nomo de la estraro kaj komitato de ISAE. Mi estas certa, ke multaj fidelaj legantoj de Scienca Revuo samopinias kaj konsente aprobas la dediĉon de tiu ĉi SR-kajero al nia respektinda jubileulo.

Kun sincera respekto,

R. Sachs, nome de la redakta stabo de Scienca Revuo

Jubili pri jubileula jubileo

RNDr. Josef KAVKA CSc. 80-jara

Ĉu la vorto "jubileo" devenas de "jubili"? Normale klerigitaj homoj eble kredas tion. Sed ne estas tiel, same kiel ankaŭ estas erare diri, ke la homo devenas de simio; ni tamen havas (kiel ni lernis en la lernejo) komunan, ne detale konatan, antaŭulon. Estas la sama kun jubili kaj jubileo: etimologoj scias, ke antaŭestis latina vorto (*jubilare*) sed supozas, ke en la plua lingvoevoluo enmiksiĝis iu praa onomatopeo de niaj hindeŭropaj prauloj por "ĝojo".

Ni do jubile festas jubileon kun granda ĝojo pri la 80a naskiĝdatreveno de d-ro Jozefo Kavka, plej elstara kunbatalanto por la prospero de nia asocio, kion ja pravas ke li estas honora membro de ISAE same kiel li ankaŭ estas honora membro de la Ĉefia Esperanto Asocio (ĈEA). La aŭtoroj en tiu ĉi kajero SR 2/2002 dediĉas siajn artikolojn kun ĝojo kaj estimo al la jubileulo pro lia vivolonga engaĝo por Esperanto kaj por Internacia Scienca Asocio Esperantista.


Jam la juna Jozefo, kiu naskiĝis la 25an de aprilo 1922 en Hořovice, meza Bohemio, kontaktiĝis kun la Internacia Lingvo; lia patro eĉ komunikis kun Zamenhof mem, la kreinto de Esperanto. Certe estis la profunda lernado de la latina kaj greka lingvoj dum liaj lernejojaroj, ke d-ro Kavka nuntempe estas unu el la plej kompetentaj – kaj pro tio ankaŭ sufiĉe timata – kritika gardisto de apliko de "scienco" Esperanto dum verkado de sciencaj artikoloj. Kiel tio aspektas, li montris (post kiam li fariĝis sciencisto-geologo, specialiĝinta al petrologio) en multegaj diversajurnalaj publikaĵoj pri genezo, evoluo, minerala kaj ĥemia konsisto de rokaĵoj kaj aliaj geologiaĵoj.

En 1948 li fariĝis ISAE-membro. Sian fidelecon kaj aktivecon li ne nur montris kotizpage: inter 1961 kaj 1973 d-ro Kavka plenumis la taskon de la landa delegito por ISAE, en 1965 li fondis kaj gvidis geologian faksekcion kaj eldonis kaj sciencredaktoris ties fakjurnalon Geologio Internacia. Kiel ĝenerala sekretario de ISAE (1971-1980) kaj ĉefredaktoro de la asocia organo Scienca Revuo (1978-1987) li funde kontribuis al la renomo de Esperanto en scienco kaj tekniko. Eĉ nun, en alta aĝo, estas videblaj lia amo al propra profesio kaj lia emo peri profesion scion al geologi-studentoj per explorekskursoj en la bohemian kamparon - spite de proaĝe iom dolorigaj genuoj.



Altruisme li pretis, denove subteni ekde 2000 la eldonan stabon de Scienca Revuo per kunredaktado, reviziado kaj lingva kontrolo de manuskriptoj, kaj revivigis pasintjare kiel "eldona motoro" fakscien-can kajeron pri geologio kadre de Scienca Revuo - kvazaŭ daŭrigon de Geologio Internacia.

Estas mia devo kaj granda plezuro kiel prezidanto de ISAE ne nur gratuli al d-ro *Kavka*, sed ankaŭ esprimi la asocian kaj mian personan dankegon al la sagaca lingva analizisto kaj brila aŭtoro, al la alte valora kaj ĉiam helpema subtenanto de nia Asocio. Li jam nun estas "legendulo" kadre de ISAE kaj certe eniros en la evolu-historion de Scienca Revuo kiel grava internacilingva scienca ĵurnalo. Mi deziras al nia 80-jaraĝa jubileulo sanon kaj familian feliĉon dum ora viv-vespero en ora urbo Prago. *R. Sachs*, prezidanto de ISAE



Speciala donaco al la jubileulo: "La legemulo" (*Der Bücherwurm*) de *Carl Spitzweg* (1808-1885), bavara pentristo en bidermejra stilo

## Tero sub akvo - akvo sub la tero en Hungario

*Endre DUDICH \**

"La riverego estas la estro  
de ĉiuj akvofluoj, ĉar ĝia  
fluejo situas plej sube"  
*Lao-Ce: "Tao te king", 66*

### Enkonduko

La unua de la antikvaj "grekaj" naturfilozofoj, Taleto el la malgrand-azia komercista urbo Mileto (kiu cetere fakte naskiĝis en fenicia familio), pensis, ke la akvo estas la *arĥé*, la pramaterio de ĉio, el kiu naskiĝas ĉiuj solidaĵoj (ekz. glacio) kaj gasoj (ekz. vaporo).

La likva akvo sendube estas unu el la nepraj aĵoj kaj kondiĉoj de la vivo, almenaŭ kiel ni konas ĝin, nome bazitan sur proteino / DNA-sistemo. Oni eĉ supozas, ke vivaĵoj povis ekzisti iam sur la ruĝa planedo Marso, ĉar oni malkovris sur ĝi spurojn de iamaj akvofluoj, kaj eĉ lago-basenojn. Krome, sur unu el la lunoj de Jupitero, Eŭropo, verŝajne troviĝas likvakva oceano sub la dika surfaca tavolo de glacio. (Ĉu tie eble povis ekzisti vivaĵoj?)

Ankaŭ la homo mem estas precipe akva - mare salakva - solvaĵo (kvankam kompreneble ne nur tio), kiel ĉiuj ceteraj vivaĵoj de la planedo Tero.

Pri la akvo oni ĉiam devas okupiĝi, ĉar

- foje ĝi ne sufiĉas, alifoje tro abundas;
- iam ĝi mankas tie, kie ĝi estas bezonata, kaj ĉeestas tie, kie ĝi superfluas, iam eĉ damaĝas;
- ofte ĝiaj kvalito aŭ temperaturo ne konvenas.

Do, okupiĝo pri la akvo estas ĉiam necesa, sed tute ne ĉiam meriton donanta kaj profitiga tasko, ofte riska kaj eĉ fiaska.

\* Ĉion bonan kaj benan, laŭmeritan, mi deziras al d-ro *Josef Kavka*, kies logikan menson, klaran intelekton kaj precizan laboron mi ĉiam admiris.